


# ESPERANTO

sub la suda kruco

junio 2024





# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA  
ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 31[2] numero 154 junio 2024

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

**Redaktisto:** Terry Manley

**Provlegantoj:** Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else

**Kunordigisto:** Jonathan Cooper

**Kontaktadreso:** [esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

## Abonoj kaj pasintaj numeroj

*Esperanto sub la Suda Kruco* estas sendata al membroj de la Aŭstralio Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: [esperanto.org.au](http://esperanto.org.au) / [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au)

NZEa: [esperanto.org.nz](http://esperanto.org.nz) / [esperantonewzealand@gmail.com](mailto:esperantonewzealand@gmail.com)

## Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, [esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

## Limdato por kontribuoj por la sekva numero

1a de aŭgusto 2024

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2024 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj  
ISSN 2207-0087

**SUR LA KOVRILLO:** *Franca Polinezio*. Foto: David Ryan.  
Pri aliaj fotoj, vidu paĝon 26.

# ENHAVO

Antaŭparolo	<b>04</b>
Helen Keller	<b>05</b>
Alia lando, alia sinteno	<b>07</b>
Esplorado pri kanbufoj en Aŭstralio	<b>08</b>
Mia patrino Lilli Giloteaux	<b>10</b>
La knabino kun la longa hararo	<b>12</b>
Vizito al Franca Polinezio	<b>19</b>
La maljunulino sen televidilo	<b>21</b>
Poeziangulo: Magdalena Ball	<b>24</b>

# Antaŭparolo

**TERRY MANLEY**

Inter la 24a kaj 26a de aprilo, grupeto de ni prilaboris la Aŭstralian Esperanto-Arkivon ĉe Esperanto-Domo en Sidnejo. Jonathan Cooper, per speciala libro-skaniilo, skanis AEA-ajn gazetojn de la pasinteco. Du el la mankantaj ESKoj, aron de *The Australian Esperantist* kaj iujn el *La Rondo* li skanis. La skanaĵoj estas en serĉebla PDF-a formato por faciligi la esploron de ia temo aŭ persono en gazeto pasinta. Tia laboro plenumas celon de la laborgrupo disponigi eldonaĵojn de AEA al la membraro elektronike. Post iom da korektado, la dosieroj aperos sur la AEA-a retejo: [esperanto.org.au/esk/](http://esperanto.org.au/esk/).

Mi, Sandor Horvath kaj Alan Turvey elprenis skatolojn el la arkiva ĉambro kaj traserĉis la enhavon de tiuj. La skatoloj

apartenis al la Manlia klubo kaj membroj forpasintaj, kiel Margaret Chaldecott, Kep Enderby, Ralph Harry kaj Volo Guettling. Ni reorganizis la materialojn en kategoriojn kaj forjetis duoblaĵojn, ekzemple UEA-jarlibrojn, UK-librojn ks, konservante unu kompletan de ĉiu. Restas multo por fari, sed almenaŭ estis alia paŝo al pliidrigita arkivo.

Ne ĉiam ni laboris. Ni kune tagmanĝis ĉe lokaj manĝejoj kaj en la vespero de merkredo tri el ni iris al la artgalerio por vespermanĝi kaj rigardi kelkajn el la montraĵoj.

Esperable la laborsesio daŭros en venontaj jaroj kaj pli da membroj povos helpi. 📧



*La Aŭstralia Esperanto-Arkivo ĉe Esperanto-Domo, Sidnejo*

# Helen Keller

## KATJA STEELE (ADELAJDO)

Helen Keller naskiĝis kiel normala bebo en Tuscumbia, Alabama, Usono, la 27an de junio 1880. Ŝia patro estis veterano de la Konfederacia Armeo, bienisto kaj ĵurnala redaktisto, la patrino, edukita virino. Helen estis 19-monata, kiam ŝi ekhavis "cerbofebron", konsekvence de kiu ŝi perdis sian vidpovon, aŭdpovon kaj parolpovon.

Oni tiam kredis, ke la malsano postlasas idiotojn, kaj la juna Helen ja estis kvazaŭ idioto – sovaĝa, kun malmulta kompreno de la ĉirkaŭa mondo.

Alexander Graham Bell, la fama inventisto, estis ankaŭ granda helpanto al surduloj. Li rekomendis al la familio Keller kontakti la direktoron de lernejo por blinduloj. Tiu konsilis, ke oni uzu la talenton de Anne Mansfield Sullivan, parte blinda dudekjara fraŭlino kun granda pacienco kaj komprenemo. Helen estis jam preskaŭ sep-jara, kiam venis al ŝi Anne, kaj ja okazis sukcesa ŝanĝo: Helen kaj instruistino (kiel Helen nomis Anne) evoluigis sistemon de komunikado per tuŝoj sur la manoj.

Iam Helen kaj la instruistino Anne staris ekstere ĉe akvo-pumpilo. Anne tiris unu manon de Helen sub la akvon kaj skribis sur la alian "W-A-T-E-R". Jen la unua lernita vorto. Post tio Helen rapide lernis kaj la man-alfabeton, kaj la brajlan. Ŝi



lernis ankaŭ legi lipojn – tuŝante ilin. En 1890 ŝi eklernis ankaŭ paroli.

En 1896 ŝi eniris Cambridge School for Young Ladies kaj poste Radcliffe College, en 1900. Ŝi finis ĝin post kvar jaroj, kun *A.B. cum laude*. Ŝi studis tie la anglan kaj la germanan (poste lernis ankaŭ la latinan kaj la francan). Ŝi konis kaj subtenis ankaŭ Esperanton. Anne estis kun Helen dum la tuta tempo. Kiam Anne edziniĝis al literatur-kritikisto John Macy (1904), Helen iris

por kunvivi kun ili kaj ricevi de la geedzoj daŭran helpon.

Helen verkis plurajn aŭtobiografiajn librojn (*The story of my life, The world I live in, Midstream, My religion*, ktp). Ŝi kontribuis ankaŭ al multaj magazinoj pri la virinaj rajtoj, socialismo, sociaj aferoj kaj ankaŭ pri blindeco (kiu temo estis ĝis tiam tabua en la virinaj magazinoj, ĉar pluraj kazoj de blindeco rilatis al seksaj malsanoj). Ŝi aperis dum kvar sezonoj ankaŭ en vodevila teatro.

Evidente Helen havis multajn pozitivajn kvalitojn kaj multaj admiris ŝiajn atingojn.

En 1936 Helen kaj Anne ricevis la Roosevelt-medalon por "Cooperative Achievement of Unique Character and Far-reaching Significance" (Kunlabora Atingo Unikspeca kaj de Vastampleksa Signifo).

*Daŭras >*



**“La plej bonajn kaj plej belajn aferojn en la mondo oni ne eblas vidi aŭ tuŝi – ili devas esti sentitaj per la koro.”**

– Helen Keller

Universitato en Filadelfio donis al ŝi doktorecon, ankaŭ universitato en Skotlando. Ŝi renkontis multajn gravajn homojn, ricevis multajn diversajn distingojn. En 1953 Helen estis proponita por la Pac-premio Nobel.

Dum sia tuta vivo ŝi estis aktivisto, vojaĝis kaj prelegis en Usono, Kanado, Eŭropo, Oriento. En 1948 ŝi estis en Adelajdo!

Dum la Dua Mondmilito ŝi vizitadis vunditajn soldatojn. Postmilito ŝi vojaĝis al Britio, Francio, Grekio, kaj Italio por kolekti datenojn por American Foundation for Overseas Blind [la Usona Fondaĵo por Alilandaj Blinduloj] pri la dummite blindigitaj kaj iliaj bezonoj. Ŝi kampanjis por fondusoj, por leĝfaraj ŝanĝoj, kaj

prelegis pri la bezonoj de blinduloj. Jam ŝiaj atingoj estis grandega pruvo, kion la blindaj kaj surdaj homoj povas atingi, sed ili bezonas lernejojn, specialistojn, monon, ktp. Helen havis grandan influon en la forigo de blindaj kaj surdaj homoj el azilejoj.

Anne, la sindonema instruisto, blindiĝis en 1935 kaj sekvajare mortis. Helen tiam transloĝiĝis al la kamparo proksime al Novjorko. Ŝi mortis 87-jara en 1968.

Ŝia vivo estis prezentita en Pulitzer-premiita teatraĵo de William Gibson *The Miracle Worker* [La miraklofaranto] (1959). Tiu estis poste filmita en 1962 kaj la ĉefrolantinoj de Helen kaj Anne ricevis Oskar-premion. **E**

*Dekstre: Helen Keller legante brajlan libron 1960*

*Malsupre: Helen Keller kaj Anne Sullivan 1893*



# Alia lando, alia sinteno

## FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

La vivokosto fariĝis tiom ne eltenebla por la aŭstralianoj kies salajro ne altiĝis de multaj jaroj aŭ trovas nur kelkajn horojn da laboro aŭ eĉ neniun laboron, ke la registaro okazigis enketon pri la prezoj en la ĉefaj ĉiovendejoj kiel Coles aŭ Woolworths. Kontraste al tio, prezoj eĉ tre altaj ŝajnas allogi certajn klientojn, laŭ la raporto de Rob Harris, aperinta en la gazeto *The Age*. Sed tiuj klientoj apartenas al alia lando. Mi tradukos por vi tiun artikolon tiel ke vi mem taksu la situacion .

*La aŭstralia mielo donas al la plej alta klaso de Britio grandan plezuron. Ĝi estas tiom bongusta, ili diras, ke la aĉetantoj de la luksa vendejo Harrods pagas pli ol \$1000 por unu vazo.*

*La tri variantoj de "Aŭstralia Rara" produktitaj en la sud-okcidento de Okcidenta Aŭstralio, la parto kiu enhavas la plej gravan biodiversecon, en kiu floras pli ol 8000 raraj specioj de floroj, estas limigitaj al 888 vazoj jare. La mielo estas metita en elegantajn donacujojn, kiuj havas individuajn numerojn, manfaritan vitran trempilon kaj estas ornamitaj de ora 22-karata skribaĵo.*

*La kunfondinto de la kompanio, Rick Bains, diras: "Vi scias, ke se vi volas bonan ĉampanon, vi iras al la franca provinco Ĉampanjo. Se vi volas bonan viskion, vi iras al Skotlando kaj se vi volas la plej bonan mielon en la mondo, vi iras al la sud-okcidento de Aŭstralio.*

*La "Aŭstralia Rara", ekskluziva kolekto, unue atingis la modajn bretojn de Knightsbridge en Londono en aŭgusto. La ekologia regiono de Okcidenta Aŭstralio etendiĝas de la golfeto Shark, pli-malpli 800 kilometrojn*

*norde de Perth ĝis Esperance en la sudo.*

*La nektaro de la floro ĵaraho produktas unu el la plej altkvalitaj mieloj en la mondo. Eble pro tio, vazo de 250g kostas £750 (\$1444):*

*Bains diras, ke la tri gustoj de la indigenaj arboj, inkluzive de "karri" (£500 por unu vazo) kaj "dwutta" (£600) estis elektitaj de teamo de mielistoj kaj sciencistoj el centoj de produktaĵoj. Tiuj mieloj estas eksterordinare puraj kaj enhavas la nutraĵojn, kiujn nur la plej bonaj mieloj povas havi .*

Ĉu ni devas kredi tion? Aŭ ĉu simple Rick Bains kapablas pravigi per belaj vortoj la prezon de tiu mielo? Ĉu la plezuro de la klientoj esence venas de la sento, ke ilia riĉeco faras de ili neordinaraj homoj pli ol de la gusto de la mielo? Se vi ne apartenas al tiu kategorio, Amazon povas vendi al vi ĉi tion je la prezo de \$20.99. **E**



# Esplorado pri kanbufoj en Aŭstralio

**DONALD ROGERS (WELLINGTON, NOV-ZELANDO)**

Bufoj estas amfibioj, proksime rilataj al ranoj, sed ĝenerale bufoj estas malpli dependaj de akvo. La kanbufo (*Rhinella marina*), estas granda bufo, indiĝena de Centra Ameriko kaj Sudameriko. Oni transportis ilin al norda Aŭstralio en 1935, kaj al kelkaj aliaj landoj, por kontraŭi la kanskarabon (*Dermolepida albobirtum*), kiu damaĝas sukerkanon. La kanbufo estas fekundega reproduktanto; inoj demetas ununuran frajbulon kun inter 8 kaj 25 miloj da ovoĵ. Ĝia reprodukta sukceso estas parte pro ĝia oportunistama dieto – mortinta kaj viva materialoj, precipe insektoj. Plenkreska averaĝo estas de 10–15 cm de longo; la plej granda registrita specimeno pezas 2,65 kg kun longo de 38 cm de muzelo al kloako. La kanbufo havas venenajn glandojn, kaj la bufidoj estas toksaj al plejaj bestoj, precipe al hundoj, kiam ingestitaj. Nun

oni konsideras la kanbufon noca, invada specio en Aŭstralio.

Simple forigi la adoltajn kanbufojn ne povas redukti la bufonombrojn longe, ĉar kanbufoj reproduktiĝas treege rapide – pli rapide ol oni povas forigi ilin. Rick Shine kaj liaj studentoj (Universitato de Sidnejo) esploras kanbufojn. Kvankam iuj aŭstralianoj konsideras la bufojn nehaltigeblaj invadantoj, la esploristoj konsideras ilin bestoj ekster ilia natura habitato.

Adoltaj kanbufoj estas ekologiaj ĝeneralistoj, volante disvastiĝantaj en iu ajn habitato, kiu ofertas manĝaĵojn kaj akvon. Ĉiu adolta kanbufo devas reiri al akvo por produkti idoĵn. Feliĉe, krita fazo en la vivhistorio – el ovoĵ, tra bufidoj, tra metamorfozo al junaj adoltoj kaj fine adoltoj – limiĝas al la frajolaĝetoj kaj ties marĝenoj.





En Aŭstralio tiaj lokoj estas relative malmultaj kaj antaŭvideblaj, do oni povas eksploati tiun vundeblecon por damaĝi ilin. Kanbufoj evoluis en Sudameriko, kie klimataj kondiĉoj, plantoj kaj bestoj estas tre diferencaj ol tiuj en Aŭstralio. En la ĵargono de la biologio de la vivanta naturo, miskongruo inter invadanto kaj ĝia nova hejmo estas "ekologia kaptilo". Oni bezonas trovi kaj eksploati ekologiajn kaptilojn. La defio estas elimini la kanbufojn sen damaĝi la indiĝenajn bestojn.

Studento Mattias Hagman trovis, ke kanbufoj reproduktas en lagetoj malprofundaj kun nekovritaj, nekrutaj, kotaj bordoj. Ili ne ŝatas fluantan akvon. Plejmultaj taŭgaj lokoj estas apudvojaj bordoj kaj konstruejoj, kiuj pleniĝas en la pluva sezono, sed estas sekaj dum la cetero de la jaro. Indiĝenaj ranoj preferas pli profundajn lagetojn kun bordoj dense kovritaj de plantoj.

En iliaj preferataj, malbelaj lokoj, la voĉoj de virbufoj bone aŭdiĝas. Bufinoj preferas malprofundan akvon, kie ili ne dronos kiam arda virbufo (aŭ duopo aŭ triopo) ekpremas ilin en la akvo. Nuntempe iuj lokaj aŭtoritatoj postulas, ke domkonstruistoj kreskigu densan vegetaĵaron ĉirkaŭ lagetoj kreitaj.

La sezono de reproduktado estas alia ekologia kaptilo. Kanbufoj kopulas en la seka sezono, malsame al indiĝenaj ranoj. Kial? Kanbufoj estas aktivaj tra la tuta jaro kaj ili perdas korpan kondiĉon dum la seka sezono kiam la manĝaĵoj estas malmultaj. Kiam la pluvo alvenas, ĉiu bufino ne havas sufiĉan energion konservitan por produkti ovojn. Ŝi bezonas kelkajn monatojn por manĝi sufiĉajn insektojn en la abundo de la malseka sezono, ĝis ŝi estos sufiĉe dika kaj forta.

La problemo estas, ke multaj lagetoj forvaporiĝas antaŭ ol la bufidoj kreskos

komplete kaj iĝos bufoj. Ankaŭ insektaj predantoj kiel akvoskaraboj reproduktiĝas dum la tuta malseka periodo, kaj tiuj malŝrumpantaj lagetoj enhavas vastajn nombrojn da malsataj cimoj – foje sufiĉe por manĝi ĉiujn bufidojn.

En 2008 studento Georgia Ward-Fear observis, ke grandaj karnovoraj formikoj manĝas multegajn bufetojn, sed malmultajn ranojn. La aŭstraliaj ranoj scias, ke formikoj estas danĝeraj kaj forfuĝas. Kontraste, la kanbufoj malatentas la formikojn ĝis estas tro malfrue. En 2011, esploristo Elisa Cabrera-Guzman trovis similan situacion pri akvoskaraboj kaj akvocimoj.

Aŭstralianoj povas helpi elimini kanbufojn per netigado de akvejoj, por ke ili subtenu diversajn insektajn komunumojn. Indiĝenaj ranidoj estas pli grandaj ol bufidoj kaj manĝas la plejmulton de la manĝaĵoj en la lagetoj. Tra multo de Aŭstralio, indiĝenaj ranoj formortis pro poluaĵoj, malsanoj kaj domaj katoj. Oni povas renversi tiun malprosperon. La plej efika rimedo subpremi la bufojn estas la aŭstralia verda arba rano (*Ranoidea caerulea*).

Micheal Crossland malkovris, ke kanbufoj konkuras inter si. Kiam bufido damaĝiĝas, ĝi sekrecias alarmajn kemiaĵojn en la akvon. Kiam alia bufido rimarkas tiujn feromonojn ĝi forfuĝas, sed se ili tre ofte ricevas la alarmojn, ili ne prosperas. Feliĉe tiu alarma kemiaĵo ne influas la ranidojn. Tamen, kanbufidoj manĝas la ovojn de sia sama specio – ili estas kanibaloj – por plibonigi la ŝancon de sia propra travivo. Ili estas imunaj al la veneno. Ili trovas la ovojn per tiesodoro, la odoro de unu el la venenoj, kiujn bufoj produktas. Ĝi nomiĝas bufagenino. Mortas la ranidoj, kiuj manĝas la ovojn de kanbufoj.

*Daŭras >*

Eksperimentoj de Michael Crossland kaj Takashi Haramura en lagetoj en la Norda Teritorio montris, ke oni povas elimini ĉiujn bufidojn tie.

Ranidoj eligas kemiaĵon, kiu havas malbonan efikon por bufaj ovoĵoj. La bufidoj, kiuj emerĝas el tiuj ovoĵoj havas diversajn nenormalaĵojn. La kemiaĵo ne influas la bufajn ovoĵojn el Kvinlando (aŭ el Havajo), nur la bufajn ovoĵojn el Norda Teritorio kaj Okcidenta Aŭstralio, la "invadantoj". Tiu diferenco rezultas de la diferencaj evoluaj premoj de la invadantoj, kompare al la bufoj de Kvinlando, kie konkursado estas pli intensa. La invadantoj troviĝas en plua "ekologia kaptilo".

Rapida evoluado de malgranda ovograndeco kreis novan vundeblecon, kiun oni povas ekspluati por elimini kanbufojn en lokoj kie ili kaŭzas la plejajn ekologian damaĝon: ĉe la invada fronto.

## Referencoj

Rick Shine, "A new toolkit for fighting the toad", en *The best science writing* 2018, ed. John Pickrell, New South Publishing, Sidnejo.

[en.wikipedia.org/wiki/Cane\\_toads\\_in\\_Australia](https://en.wikipedia.org/wiki/Cane_toads_in_Australia)



# Mia patrino Lilli Giloteaux

## NICOLE ELSE (SIDNEJO)

Mia patrino naskiĝis la 29an de februaro 1924. Do ŝi fariĝis 100 jara la 29an de Februaro 2024 se ŝi ankoraŭ vivus. Tamen ne estus ŝia centa naskiĝtago, ĉar ja ofte estas jaroj sen 29a de februaro. Estus nur la 25a. Bedaŭrinde ŝi havis nur 23 verajn naskiĝtagojn. Ŝia patrino,

mia avino, vivis ĝis 102, sed bedaŭrinde mia patrino eĉ ne atingis 90. Ŝi kreskis en Germanio. Ambaŭ ŝiaj gepatroj jam estis esperantistoj kiam ŝi naskiĝis. La gepatroj decidis paroli hejme nur en Esperanto unu tagon ĉiun semajnon. Tamen tio devis halti kiam Hitler regis, ĉar



*Berlino, Germanio en 1948. Maldekstre sidas mia patrino. Apud ŝi sidas ŝia fratino. Tute dekstre sidas mia avino, malantaŭ ŝi staras mia avo.*



Supre, maldekstre: Somerkursaro 2006: mia patrino meze; apud ŝi, Sandor Horvath

Supre: Mia patrino en Sidnejo

Maldekstre: Du paĝoj el Arboj 2: Plurlingva terminaro, 1995

li ja malpermesis la uzon de Esperanto.

Mia patrino enamiĝis kun mia patro pro Esperanto. Ili geedziĝis kaj mia patrino translokiĝis al Francio. Dum kelkaj jaroj ilia sola komuna lingvo estis Esperanto, tamen iom post iom mia patrino lernis la francan.

Multaj aŭstralianoj konas mian patrinn kaj patron, ĉar ili vizitis Aŭstralion preskaŭ ĉiun jaron, partoprenis plurajn aŭstraliajn somerkursarojn kaj vizitis la Esperanto-klubon de Sidnejo. Mia patrino tre amikiĝis kun esperantistinoj el Manly, ekzemple Irina, kaj ĉiam plurfoje veturis al Manly por babili kun la lokaj Esperantistoj tie. Ŝi tre amikiĝis ankaŭ kun Henriette, esperantistino el la Centra Marbordo, kaj ofte vizitis ŝin.

Mia patrino tre ŝatis verki poemojn en Esperanto: vidu [youtu.be/Wxz8NGEGki4](https://www.youtube.com/watch?v=Wxz8NGEGki4). Ŝi ja enestas en *La ordeno de la verda plumo*, libro pri verkistoj en Esperanto. Ŝi ankaŭ verkis artikolojn de tempo al tempo.

Alia hobbio kiun ŝi ege ŝatis estas desegni kaj pentri. Ŝia plej bona amiko estis esperantisto el Nederlando, kiun ŝi vizitis ĉiun monaton, kaj ĉiun semajnon ili interŝanĝis longajn leterojn. Mia patrino ilustris la leterojn per desegnoj. La nomo de tiu amiko estas Leen Deij. Ankaŭ li estis poeto kaj verkisto de ege multaj artikoloj en Esperanto. Mia patrino ilustris kelkajn el la poemlibroj de Leen.

Mia patrino tre ŝatis Sidnejon kaj multe promenis. Dum ekskursoj ŝi ĉiam kunprenis paperon kaj akvarelojn por povi sidi sur benko kaj pentri. Ŝi ŝatis naturon kaj speciale arbojn. Ŝi verkis terminologian libreton pri arboj, mem desegnante ĉiujn arbojn en tiu libreto. Esperantisto en Kroatio organizis ekspozicion de ŝiaj akvareloj en Bjelovar en 2020.

Mia patrino forpasis en 2013 iom antaŭ ol fariĝi 90-jara. 📄

# Elĉerpaĵo el membiografio de Catherine Gluck: La knabino kun la longa hararo

## TRADUKITA DE TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

*Iom pri la verko: Pasintan jaron, kiam mi vizitis Esperanto-Domon en Sidnejo, mi rimarkis sur tablo libreton neimponan. Trafoliante ĝin, oni ne trovas ligan al Esperanto escepte, ke Kep Enderby verkis la enkondukon por ĝi. Mi memoras la nomon de la aŭtorino, ĉar en la 1990aj jaroj ŝi heredigis sufiĉe grandan sumon al la Esperanto-Federacio de NSK. Do mi portis la libreton hejmen kaj post legado pensis, ke valoras traduki ĝin memore al Catherine Gluck.*

*Catherine naskiĝis en Hungario en 1906 kaj enmigris Aŭstralion en 1950. Jen iom el la traduko.*

Miaj gepatroj geedziĝis en Kabold-Kobersdorf la 31an de januaro 1904. Estis sunbrila, vintra tago kaj la stratoj kovriĝis de neĝo. Dum ili promenis laŭ la ĉefstrato al la sinagogo, pasantoj admire rigardis al belaspekta paro. La edziĝfesto daŭris dum du tagoj, kaj ĉiuj en la urbo estis invititaj! Post la mielmonato, ili loĝis en Budapeŝto, la ĉefurbo de Hungario. Tie ili aĉetis duetaĝan domon en riĉa parto de la grandurbo, nomita Fasor (arboavenuo) en Józsvika utca, kaj li establis firmaon pri elektraĵoj kaj inĝenieraj aĵoj, montrante lumojn, lustrojn kaj elektraĵajn instalaĵojn. La supra etaĝo estis nia loĝejo, kie en 1906 mi naskiĝis. Mi estis nesana infano. Najbaroj kaŝe komentis, ke ili kompatas mian patrinon, ĉar ŝi "portas mortintan bebon en siaj brakoj." Tamen mia obstina instinkto instigis min batali kaj plu vivi.

Fred naskiĝis dek tri monatojn poste, la 9an de majo 1907. Li, ĝentilulo, ĉiam prizorgis pri mi, tenanta mian manon por transiri la straton. Mi iĝis la centro de lia atento kaj zorgo. Kiel infanoj ni ofte surhavis similan vestaĵon, tiel nomatan maristan kompletan. Mi kun jupo kaj li kun mallonga pantalono. Personoj pensis, ke ni estis ĝemeloj. Lun tagon promenante kun patrino mi rimarkis ombrelon tra

butika fenestro. Kompreneble mi deziris havi ĝin kaj eniris por elekti. Kiam patrino notis, ke mi mankas, ŝi ploris, ĉar ŝi ne povis klarigi, pro sia nebona rego de la hungara. Mi supozas, ke la stabo en la butiko parolis al mi ĝis iu venis por hejmen gvidi min. Baldaŭ iu rimarkis la similajn maristajn kompletojn kaj alvokis al patrino. Estis mia unua desapontiĝo, kiam mi sciis, ke mi ne ricevos ombrelon. Ekde tiam mi preferas uzi pluvmantelon ol porti ombrelon.

Miaj plej fruaj memoroj estas pri la infanĝardena aĝo. Onkline Nelly feriiis en Zebegény, artista feriejo apud la Danubo, unu horon for de Budapeŝto per boato. Ŝi altenis miajn manojn en la siaj, kaj petis min esti kvieta kaj aŭskulti ŝian kantadon.

La patro de mia patro loĝis kun ni en aparta ĉambro. Li estis dika viro kun rozkoloraj vangoj, ĉiam feliĉa kaj ridetanta. Li ofte kartludis kun mia patro.

Patro dungis elektristojn por ŝanĝi gasajn lumojn al modernaj elektraĵoj. Je plenokupa tago elektristo estis malsana kaj ne alvenis por labori. Malgraŭ la manko, patro ne deziris malkontentigi la posedanton de sanigejo, kaj konsentis memfari la urĝan laboron. Li prilaboris

plafonon de litĉambro, sur ŝtuparo, kiam la helpanto, kiu tenis la ŝtuparon, ekbruligis cigaredon. Gaso, kiu eniris la ĉambron eksplodis kaj patro falis kontraŭdorse sur la litfinajon. Policianoj venis al nia domo por klarigi kio okazis, sed patrino ne povis kompreni ilin. Ili venigis nin, en la policaŭto, al la malsanulejo. Patrino serĉis ĉien en granda fako sed ne povis trovi lin. Sed li aŭdis la voĉojn infanajn kaj alvokis

nin. Escepte de lia buŝo, okuloj kaj oreloj, ĉio kovriĝis per bandaĝoj kiel mumio. Eĉ liaj manoj estis bandaĝitaj. Li suferis pro rompita dorso kaj gravaj bruloj sur la brusto, vizaĝo, brakoj kaj manoj. Post restado de semajnoj en la malsanulejo, li ankoraŭ bezonis lambastonojn por promeni kaj devis surhavi pezan korseton kaj tage kaj nokte. Li ŝrumpis. Li bezonis

*Daŭras >*



*Budapeŝto*



longan tempon por resaniĝi.

Je tiu tempo estas asekuo por dungitoj sed ne por dungantoj, do por patro, la estro, estis nenia kompensaĵo. La grandajn fakturojn por kuracado ni pagis el ŝparokonto. Avĉjo estis nur antaŭfiguro. Sen patro la firmao paneis kaj miaj gepatroj estis senmonaj kun du infanoj, mi kvinjaraĝa kaj Fred kvarjaraĝa. Parenco, kiu estris presan kaj paperaĵan kompanion, helpis nin. Li informis patron pri nova lernejo, Ferencváros, en Gyáli-ut ĉe la limoj de Budapeŝto. Li ofertis provizi la butikon kredite kaj patro malfermis sian unu-personan butikon. La proksima lernejo havis du tri-etaĝajn konstruaĵojn, unu por knabinoj kaj unu por knaboj. Patro vizitis la ĉefinstruistojn de ambaŭ, prezentis sin kaj petis iliajn subtenon por lia entrepreno. Li proponis provizi la lernejon per specifaj paperaĵoj laŭ bezono – grandeco de marĝenoj, koloroj de linioj, ks, detaloj por iliaj kajeroj.

Li eĉ donis al ili tridek tagojn da kredito. Ili promesis subteni lin.

Necesis translokiĝi el nia eleganta domo al publika apartamento, dek minutojn per promeno for de la butikoj kaj proksima al la lernejo. Patro ellitiĝis je la kvina matene, eĉ en la malvarmego de vintro, por vendi ĵurnalojn kaj magazinojn al preterpasantaj laboristoj. Ni ĉiuj helpis, kiel eble, kaj la entrepreno prosperis tiom, ke la monprunto, ĉiam ĝeno por patro, baldaŭ estis pagita.

La baza lernejo, por mia frato kaj mi, estis proksima, sed por la gimnazio ni devis marŝi dum horo. Tio estis danĝera speciale en la vintro kiam ni devis marŝi laŭ glataj kaj glacikovritaj vojoj, portante pezajn librojn necesajn por niaj studoj.

Post la unua mondmilito la nederlanda registrato invitis hungarajn infanojn veni kaj resti kun familioj por sane refortiĝi.

Multaj hungaraj gepatroj akceptis tian helpon kaj la "nederlandaj" gepatroj skribis leterojn en la germana al la hungaraj gepatroj. Kie ni loĝis, apud la Purigada Fako de Budapeŝto, preskaŭ ĉiuj estis manlaborantoj. Tial ne multaj scipovis legi kaj skribi eĉ en la hungara. Lun tagon sinjorino alproksimiĝis al mi en la strato kaj petis min traduki leteron germanlingvan kaj ankaŭ respondi al ĝi. Tiam ŝi petis min "kiom kostas?". Mi respondis, ke mia patro estras butikon kaj se ŝi aĉetas skribmaterialon tie, la traduko kaj skribado kostas nenion. Onidiro ĉirkaŭiris kaj kelkaj petis min skribi leterojn en la germana al la "nederlandaj" gepatroj.

Ni estis intima familio kaj ĉiam sidis kune je manĝotempo kaj diskutis la aferojn de la tago. Lun vesperon mia patro menciis, ke li ne komprenas kial subite la vendado de skribmaterialoj kaj poŝtmarkoj furoras. (Patro pro handikapo, havis rajtigilon por vendi poŝtmarkoj, kaj tiel gajni duonprocentan rabaton). Kiam mi klarigis al li kio okazis, li tre fieris pri mi. Mi feliĉis kaj plu admiris la patron, kiu siaflanke amis sian 'unuan filinon'.

Patrino estis dediĉita, amanta edzino kaj zorgemega patrino por ni. Ŝi sidis kun ni, kontrolis niajn hejmtaskojn, helpis nin pretigi niajn lernejalizojn por la venonta tago, kaj iris kun ni al kaj de la lernejo. Ni devis edukiĝi bone kiel niaj kuzoj, kiuj estis gefiloj de profesiuloj. Tiam muziko estis edukada programo por gelernantoj. Fred lernis la violonon kaj mi la pianon. Ni ankaŭ lernis danci, kaj estis dancpartneroj. Liaj graciaj paŝoj kaj elegantaj moviĝoj, portantaj min enviigis la aliajn knabinojn. Ni ofte kuniris al la teatro, koncertoj kaj kinejo, ĉiam kune. Mi memoras nostalgie, ke en tiu epoko pianisto ludis dum la silentaj filmoj. Rigardante la fingrojn de

la pianisto mi estis sorĉita.

Se dum la tago, mi kaj Fred plendis pri malsato, patrino donis al ni karoton, pomon aŭ brasikrapon, sed neniam dolĉaĵon. Kiam patrino stranĉis cepojn ŝi vokis al ni apudstari ĉar la fumoj helpus nian okulsanon. Baldaŭ larmoj surverŝis niajn vangojn. Post la vespermanĝo ni ofte ludis kun niaj gepatroj -ludojn kiel domenon, naŭpeca ludo (malom), kaj trendelly.

Patrino iom post iom malsaniĝis kaj pli ofte restis en la lito. Fred kaj mi post la lernejo devis prizorgi la domon, sed unue devis fari la hejmtaskojn. Fred ĉiam estis okupata. Li dishakis ŝtipojn de ligno por la vintrofajroj, stakigis ilin apud la ekstera laborbudo, kaj kiam bezonata, portis ilin al la forno kaj kameno. Ni stokis ankaŭ karbon por la vintro. Fred akvumis la du ĝardenetojn kiam necese. Mi devis helpi patron en la butikoj. Miaj taskoj estis: restoki vendotaĵojn sur la bretojn; fari la kostetikedojn por la vendotaĵoj; liveri mendojn; kontroli enirantajn kontojn; iri al la pogranda vendejo kaj porti la vendotaĵojn al la butikoj; liveri mesaĝojn ktp.

Ni ĉiam maltrankviliĝis pri la malsano kaj suferado de patrino kaj ne sciis kion atendi. Patro havis konstantan doloron en la dorso, kaj tial devis engluti drogojn. Sed li neniam plendis.

Kaj antaŭ kaj malantaŭ nia apartamento ni havis ĝardenetojn, kie ni kreskigis aromherbojn, laktukojn, cepojn, petroselon kaj paprikojn. Je la fino de aŭtuno ni plenigis lignajn skatoletojn per riĉa nigra tero kaj en tiuj subterigis terpomojn, karotojn kaj pastinakoj por konservi ilin tra la longaj vintroj dum kiuj nur lentoj kaj fazeoloj abundis. Estis bone havi freŝajn legomojn dumvintre. En la somero ni aĉetis maturajn fruktojn

grandkvante kaj konfitis ilin en bokaloj kun sukero. Iom da freŝaj pomoj ni metis sur la vestoŝrankoj. La bonodoro de la pomoj estis instigo por fari neatenditan bonan agon kaj ricevi freŝan frukton kiel rekompenco.

## La Unua Mondmilito

Dum la Unua Mondmilito en 1916 manĝaĵo mankis. Porciolimigoj komencis kaj oni devis vicumi por manĝaĵo kaj necesajoj de la domo, sub pluvo aŭ sub suno. Ekskluzivaj klaŭzoj iĝis leĝoj, kaj tio signifis, ke judaj studentoj ne plu povas ĉeesti universitaton.

Post la milito ĵurnaloj en Budapeŝto petis legantojn donaci al la Szurmay fonduso, por helpi invalidojn, vidvinojn kaj orfojn. Donacoj estis publikigitaj tage. Mi estis dekjaraĝa kaj mi proponis mian longan hararon fortranĉitan, kiel aŭkcioĵo por la fonduso. La ĵurnalo respondis per letero sur la unua paĝo. – “Ni devis skribi leteron al knabineto, Fraŭlino Katalin Lamberger lernanto de la unua jaro, IX Fületi utca 6.”

Kara Katalin Lamberger skribis al ni: ŝi ne havas monon por donaci al la parencoj kaj vidvinoj de la mortintaj soldatoj, kaj iliaj orfoj. Ŝia patro, invalido, ne enspezas sufiĉan por doni monon al ŝi, por ke ŝi plenumu la deziron de sia koro. Do ŝi decidis donaci sian bone prizorgitan longan hararon kaŝtankoloran, aŭkcio por la Szurmay fonduso. Ŝi opinias, ke tia estas la devo de lojala civitano.

“Kara Katalin, via bela hararo devas ornami vian kapeton multe pli longe. Ni kredas, ke via propono estas bona ekzemplo por la pli riĉaj legantoj. Multaj firmaoj, bankoj, entreprenantoj kaj aliaj civitanoj gajnis multe da mono dum la milito, do ne necesas, ke knabineto, kiel

vi, oferu la belan hararon. Tiuj pli riĉaj civitanoj konsciiĝos, ke estas ilia devo kaj la devo de la hungara komunumo, prizorgi siajn revenintajn soldatojn, vidvinojn kaj orfojn.”

*AZ EST 15an de aŭgusto 1917*

Je la fino de la Unua Mondmilito soldatoj komencis hejmeniri. La ekonomio de la lando kaj vivkondiĉoj iĝis malbonaj, malbonegaj. Lun tagon onklo Schani revenis en ĉifona uniformo. Li estis la plej belaspekta el la fratoj de mia patrino. Li estis eksigita el la armeo, suferanta pro frostvundoj de la piedfingroj, iujn el kiuj li perdis kaj poste lame marŝis. Antaŭ ol reveni al lia nutrovarajo en Sopron, li restis kun ni kelkajn tagojn. Li atingis nin, malsata, frustrita, mizera kaj malfeliĉa, pensanta pri siaj infanoj, du knaboj kaj knabino. Li petis al patrino kuiru “Marillen Knödel” (abrikotajn pastbuletojn), lian plej ŝatatan manĝaĵon. Kutime ĉiu ricevis po kvar buletojn, sed kiam ili aperis sur la tablo, onklo manĝis ĉiujn. Li ne povis rezisti!

Ankaŭ onklo Michael, pli juna ol mia patrino, restis kun ni dum iom da tempo. Li estis preskaŭ blinda kiam eksigita el la armeo. Li ne ankoraŭ edziĝis. Onklo Beni estis la plej ŝatata el la fratoj de patrino kaj posedis tekstilan firmaon en Vieno. Plej proksima al la aĝo de patrino, li ofte monsubtenis nin dum niaj mizeraj travivaĵoj.

## **La jaro 1919**

Lun tagon mia patrino tondis ruĝan puloveron en striojn por dekoracii la fenestrojn. Estis 1919 kiam la komunistoj komencis regi Hungarion. Ni ne havis multon por manĝi, ĉar estis malmulte havebla tiam. Mi memoris, ke ni fabrikis kandelojn en ŝupoluraĵaj skatoloj. Peco de fadeno estis metita en la mezon kaj

vakso verŝita en la malplenan skatolon.

Iusence ni estis feliĉaj; ni havis patron kun ni. Ne estis multaj viroj en la ĉirkaŭaĵo. Ili aŭ estis for en hospitaloj aŭ kiel militmalliberuloj. Kiel invalido oni ne postulis al patro militservi. Li organizis “hejmsekurigan servon” kun instrukcio al virinoj kaj infanoj pri kiel alfronti la malfacilaĵojn. Multaj sentis panikon. Patro estis populara, ĉar li ne nur donis konsilon malavare, sed ankaŭ subtenis malsanulojn, solulojn kaj malriĉulojn pri iu ajn problemo. Li elradiis dignon, sen pompo eĉ kiam suferanta pro dorsdoloro.

Nia butikoj estis apud la milita malsanulejo, Honvéd Kórház. Ofte funebra procesio komencis ĉe la malsanulejo kaj preterpasis nian butikon kun milita orkestro ludanta la funebran marŝon de Chopin. Mi kaj aliaj lokaj infanoj sekvis la procesion kiel funebrularo, ĉar la familianoj de la mortinto ne povis ricevi averton sufiĉe frue. Iufoje estis tri funebroj tage. La lokaj infanoj iom post iom havis permeson viziti soldatojn en la malsanulejo. Ni sidis kun ili apud la florbetoj, parolantaj kun ili kaj ludantaj. Tio helpis kontraŭ ilia suferado kaj soleco. Estis malfeliĉa afero, junaj viroj sen brakaj aŭ gamboj, kun bandaĝoj sur ĉio- kapo, brakoj, piedoj kaj okuloj. Aliaj promenis kun lambastonoj aŭ kun brakoj en skarpoj, iuj preskaŭ blindaj, ĉiuj invalidigitaj pro la milito.

Nia loĝloko estis tia de laborantoj. Tiuj ricevis salajrojn monate kaj povas aĉeti nur kredite. Patro donis al aĉetantoj libreton por registri detalojn de iliaj kontoj. Patro plenigis similan notlibreton. Antaŭ la fino de la monato estis mia tasko resumi ĉiun konton. Foje estis 50 libretoj por prilabori. Estis mia unua kontada laboro kaj mi estis nur 12 jaraĝa!

Mi envias la nunan generacion. En

mia juneco oni ne havis kunmiksilojn, polvosuĉilojn, lavmaŝinojn aŭ elkranan varmakvon. Ni ne havis eĉ banĉambrojn. Ĉiuj taskoj estis permanaj. Ni fieris fari taskojn ĝuste kaj ĝuis tion. Ĉe la lernejo ni devis triki ŝtrumpojn, ŝalojn kaj gantojn en kakia koloro por la soldatoj. Estis bona trejnado por mia trikada scio.

## Fiŝa interveno

Dum somero ni invitiĝis viziti onklinon Ella, la plijunan kaj solan fratinon de patrino. Ŝia edzo estis Herman Breier. Ili posedis unuetaĝan domon sur Ó-gabona tér, Sopron, kun fiŝvendejo kaj apud la strato estis la plej granda fiŝujo en la lando. Aĉetontoj, per fiŝreto kun longa tenilo, kaptis la fiŝojn deziratajn el la ujo. Kiam la reto estis plena da vivantaj fiŝoj ili portis ĝin al la pesilo. La fiŝoj aĉetataj estis vivantaj. Je vendredo estis la pleja vendado. Ĉiun jaron je la lernejferioj, Fred kaj mi trafis trajnon de Budapeŝto al la soprona stacidomo, kie onklino Ellen renkontis nin. Iun vesperon onklino ploris dolore ĉar barelo alvenis kun mortintaj fiŝoj en si. Mi subaŭskultis la konversacion pri tio. La barelon oni metis ĉe la malantaŭo de la domo por ke la rubajkolektistoj forportu ĝin la venontan tagon. En la mateno mi iris al la butikoj kaj observis la aĉetontojn, tiam ŝteliris al la barelo elprenis fiŝon kaj metis ĝin sur la pesilon. Mi fieris helpi la geonklojn pri ilia perdo. Je la vespero la barelo estis preskaŭ malplena. Sed mia helpo ne finiĝis feliĉe! Sekvan tagon aĉetintoj revenis por plendi, ke inter iliaj aĉetoj estis mortinta fiŝo. Onklino ne komprenis. Neniama okazis tiel antaŭe. Ŝi provis ekspliki, ke nur vivantaj fiŝoj estas en la fiŝujo el kie ili kaptis la fiŝojn. Baldaŭ geonkloj trovis la malplenan barelon kaj kiu kulpis pri tio. La postan tagon geonkloj sendis nin hejmen kaj ne plu invitis nin.

## La lernejojaroj ĝis 1924

Kiam mi havis 12 jarojn ni devis respondi demandon ĉe la lernejo. La demando estis "Kion vi deziras fari kiam vi forlasos la lernejon." Iu knabino respondis: "Mi deziras trovi edzon blondan kun blujaj okuloj, ktp." Alia respondis: "Mi deziras edziniĝi kun kuracisto kaj naski multajn infanojn." Mi respondis, ke mi deziras havi domon, kiun mi bele dekoracios por fierigi miajn gepatrojn. Ĉe hejme mi estis dorlotata. Mi nomiĝis "*Das Kind*" (La Infano). Mi povis nur esprimi deziron kaj la gepatroj kaj Fred plenumis ĝin.

Dekkvarjara mi iris al gimnazio Mester Utca por Knabinoj. Estis tri klasoj samnivelaj: A, B kaj C. Mi aliĝis al klaso C. Ĉiun jaron je Matura tempo, oni nomumis knabinon studanto de la jaro. En 1924 oni elektis min tiel kaj mia foto pendiĝis en la koridoro laŭ tiu jaro. Ĝi ankoraŭ pendas tie. Mi atingis plejaltgrade en ĉiu studtemo kaj pro tio mi fieris kaj feliĉegis inter miaj gelernantoj.

Patro ĉiam ŝatis kontentigi min. Patrino ofte zorge rigardis min por konstati ĉu mi kontentas. Kiam patro petis sian fratinon, onklinon Lola, elekti pianon por mi, mi tre ekcitiĝis. Mi baldaŭ ricevis brilan nigran pianon. Mi devis ekzerci ĉe ĝi ĉiun tagon. Mi brodis *kelim* kovrilon por ĝi per diverskoloraj silkoj. Post multaj semajnoj de brodado, ĝi bele aspektis.

Fred ĉeestis la gimnazion la sekvan jaron. Li ne estis nur mia frato sed mia lojala amiko, mia protektanto kaj dediĉita kunulo. Mi estis lia plej ŝatato. Li estis altstatura kaj bonaspekta. Homoj turnis la kapojn por rerigardi lin. Li estis pli alta ol mi, plena je vivo, havis bone proporciajn korpon, specialan promenmanieron, belajn manojn kaj bone prizorgatajn fingro-ungojn. Li havis veran talenton

*Daŭras >*

por ridigi homojn per siaj ŝercoj.

En la lernejo ni ambaŭ elektis la francan por lerni anstataŭ la germanan kiel duan lingvon. Lun jaron mi ricevis premion kiel ĉampiono de stenografio por la jaro. La sekvan jaron Fred ricevis la saman premion. Poste ni private lernis stenografion en la germana, la franca kaj la angla.

### **Mia unua bankokonto**

Antaŭ la fina ekzameno por la *Matura*, iuj gepatroj petis la lernejestron pri privataj lecionoj por siaj infanoj por certigi, ke tiuj sukcesos en la ekzameno. La lernejestro ne deziris organizi kromajn lecionojn en la lernejo. Tamen ŝi informis min pri la afero kaj rekomendis, ke mi helpu la lernantojn, kiuj lernas malrapide. Mi diris, ke mi devos peti la gepatrojn por permeso. Ili konsentis, se mi nur restus unu horon post la kutimaj lecionoj. Post kiam mi proponis la lecionan koston, mi surpriziĝis, ĉar ĉiuj lernantoj donis al mi tiom. Mi ne atendis, ke mi povus enspezi tiom da mono. Baldaŭ mi havis bankokonton. Mi mem povis pagi por du-semajna ferio ĉe Erböbénye, malgranda feriejo en la montoj por nur knabinoj. Tie mi renkontis multajn knabinojn, amikiĝis kun iuj kaj invitiĝis al ties hejmoj por renkonti la gepatrojn kaj familianojn. Fred ĉiam akompanis min, ĉar mi ne rajtis iri ien ajn sen li. Ĉiuj el la knabinoj ŝatis lin kaj nomumis lin *Ramon Navarro*, kiu estis tre populara hollywooda aktoro.

### **Laboraj jaroj**

Post la *Matura* ekzameno mi devis serĉi laboron. Mi telefonis kaj skribis multajn leterojn sed sensukcese. Mi senesperigis kaj sopiris enspezi. Mi jam havis sperton en oficejo pro la rekomendo de mia historia instruisto. Dum la

lernejferioj, inter la 15a de julio 1923 ĝis la 31a de aŭgusto 1923, mi laboris por d-ro Endre Lengyel, advokato kaj leĝkonsilisto por la Ŝtata Transporta Fako. Por mia laboro mi ricevis vojaĝbileton, kio ebligis min vojaĝi ĉien en Budapeŝto per la publika transporta sistemo. Mi uzis tiun oportunon plene kaj vojaĝis multe, speciale je la semajnofinoj por alkutimiĝi al la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Mia dua posteno estis ĉe la fama firmao, Weertheim Elevator Works. Post mia unua intervjuo por la posteno ili diris "Ni kontaktos vin." Mi atendis kaj atendis sed nenia invito al la posteno atingis min. Mi reiris por peti la firmaestron pri la posteno. Li ĝentile konsilis min iri hejmen dirante, "Ni kontaktos vin." Mi ege deziris la postenon. Finfine mi havis provsemajnon pri la posteno. Poste mi lernis, ke li proponis tion ĉar li pensis, ke sen tio mi daŭre ĝenus lin. Eble li ne havis fidon pri retirema, sensperta, lernejueto. Sed post la unua semajno mi ricevis pli altan salajron.

Weertheim Elevator Works estis tri-etaĝa konstruaĵo kun granda fabriko, kie laboristoj muntis liftojn kaj rulŝtuparojn. Tiuj estis instalitaj en lokoj eĉ tiel for, kiel la Balkanoj. La firmaestro estis aŭstro, kiu ne parolis la hungaran. Li bezonis iun, kiu flue parolis kaj la hungaran kaj la germanan. Li diktis en la germana kaj se li bezonis leterojn en la hungara li petis min traduki. Mi laboris apud la estro en malgranda oficejo kun granda fenestro, skribotablo, tajpmaŝino, telefono, ŝranko por valorpapiroj kaj paperujo. Estis remburita flankopordo al la oficejo de la estro nur por mi. Neniu povis kontakti la estron sen intervjuo kun mi. Mi ekscitiĝis kaj rakontis pri ĉi tio hejme. Kiam mia patrino aŭdis, ke nur pordo apartigis min de la oficejo de la estro, ŝi maltrankviliĝis,



ke ŝia eta filino povus esti sola kun la estro. Kelkajn tagojn poste la pordisto telefonis min kaj diris “Fraŭlino Kató, via patrino estas ĉi tie, alvenu mi petas.” Mi paniĝis, pensante ke io misokazis en la hejmo kaj rapide iris malsupren laŭ la ŝtuparo kaj trans la korton al la pordego. Patrino ridetis al mi kaj diris, ke ŝi deziras renkonti la estron. Je tiu epoko gefiloj

obeis la gepatrojn sen demandoj. Ni iris al la unua etaĝo per la lifto. Mi frapis ĉe la pordo de la estro kaj informis lin, ke mia patrino deziras paroli kun li. Iom poste mia patrino ridetanta elvenis kaj diris: “Jes, vi povas plu labori ĉi tie.” Patrino malkovris, ke li, kiel ŝi, devenis de la sama vilaĝo Burgenland kaj ke li estas edzo, kaj tial ĉio estas en ordo. **E**

## Vizito al Franca Polinezio

### DAVID RYAN (WELLINGTON, NOV-ZELANDO)

En decembro 2023 mi pasigis unu semajnon kun mia familio en Franca Polinezio. Fakte, oni ofte parolas pri tiu insularo kiel “Tahitio” sed Tahitio estas nur la plej granda el 118 insuloj de nesendependa teritorio de Francio en la suda Pacifika Oceano, je 4–5 hora flugo el Aŭklando (ne estas rektaj flugoj el Aŭstralio – aŭstralianoj devas fari halton en Aŭklando). Aliaj konataj insuloj estas

Moorea (pli populara por turistoj) kaj Bora Bora. Ĉi tiun lastan atolon ofte vizitas riĉuloj en privataj aviadiletoj por ferii en luksaj super-akvaj kabanaroj.

La insularo de Franca Polinezio havas loĝantaron de 280 000, kaj plejmultaj enloĝantoj loĝas en la insulo Tahitio, kie troviĝas la ĉefurbo, Papeete, kaj internacia flughaveno.

*Daŭras >*



Franca Polinezio gravas por Francio pro la vasteco de la mara teritorio riĉa je fiŝoj kaj verŝajne abundeco de aliaj naturaj resursoj. Por mia familio, Franca Polinezio estis turisma/feria loko kaj ni pasigis tre belan semajnon sub la forta, brila suno. Ni naĝis, manĝis freŝajn fruktojn, sunbruniĝis, kaj parolis france. Nia hotelo troviĝis ne for de la flughaveno. Lun tagon mi vidis alvenon de aviadilo de Air France kaj mi pensis, ke je surteriĝo post kelkaj minutoj la pasaĝeroj trovos, ke ili forlasis tre malvarman, neĝkovritan Eŭropon kaj nun ili alvenas en ege varma, ĉarma, verda paradizo. La temperaturo dum nia restado atingis preskaŭ 30 gradojn kaj, kvankam temis pri la pluva sezono, pluvis dum nur 30 minutoj dum nia tuta restado.

Dum nia vizito ni iris en du ekskursoj, kie ni vidis montojn, belajn plaĝojn, restaĵojn de indiĝenaj temploj, kaj kampojn, kie oni kultivas amason da fruktoj. Franca Polinezio estas ege verda teritorio kaj mi imagas, ke la tiea vivo povas esti tre facila

kaj agrabla: fruktoj, fiŝoj, suno, naĝado, ktp. Mi komprenas kial en 1789 ŝipanoj de la fama Bounty pasigis kelkajn monatojn sur la insulo de Tahitio kaj poste ribelis kontraŭ la ŝipestro ĉar ili jam kutimiĝis al tre feliĉa vivo sur la insulo kaj ne volis forlasi tiun paradizon.

Ĉio en Franca Polinezio estas ege multekosta ĉar oni importas multajn varojn el Francio, kaj iomete ankaŭ el Nov-Zelando kaj Aŭstralio. Pro tio, Franca Polinezio ne estas tiel populara malmultekosta turisma loko kompare kun Fiĝio, Samoo, ktp, kaj ne estas tiom da regulaj flugoj. Estas rektaj flugoj plejparte el Nov-Zelando kaj Usono. Eĉ francoj kiuj volas viziti sian teritorion devas fari halton en Kalifornio. Tamen, por tiuj kiuj volas paroli la francan, vizito al Franca Polinezio rekomendindas. Oni parolas ankaŭ lokan indiĝenan lingvon kiu, laŭ mi, similas al la nov-zelanda maoria lingvo. Mi povis kompreni kelkajn vortojn kaj frazojn. **E**



# La maljunulino kiu ne posedas televidilon

NICOLE ELSE (SIDNEJO)


*Jam la trian fojon mi partoprenis en INK (Interkultura Novelo-Konkurso). La unuan fojon mi estis inter la finalistoj kaj mia novelo estis publikigita en libro. Tamen miaj duaj kaj triaj provoj ne estis samsukcesaj. La konkurso fariĝis sufiĉe populara kaj ili ricevis pli ol 1300 novelojn. La temo por la 4a konkurso estas "Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj Homo sapiens". Detalojn oni trovas ĉe [bobelarto.ink/konkurso](http://bobelarto.ink/konkurso). La limdato estas la 30a de junio 2024. Do ekverku! La novelo povas esti tre mallonga.*

*La temo de la 3a konkurso estis "La sekreta vivo de miaj najbaroj". Jen tio kion mi verkis.*

Mi estas 25-jara virino kaj loĝas en apartamentaro en granda urbo. Jam de du jaroj mi loĝas tie, sed mi devas konfesi, ke mi apenaŭ konas miajn najbarojn. Mi ja foje vidas ilin kaj salutas ilin, sed mi neniam prenas la tempon por vere interparoli kun ili. Dekstre de mia apartamento loĝas maljunulino. Foje mi vidas ŝin. Ŝi kutime surhavas

malnovajn vestaĵojn, ne ŝminkas sin, tute ne aspektas bela. Krome mi neniam vidas, ke ŝi havas vizitantojn. Supozeble ŝi estas malriĉa, soleca persono, kiu havas neniun kun kiu paroli. Kion ŝi faras dum la tuta tago? Certe ŝi pasigas multajn horojn sidante antaŭ televidilo.

Je la alia flanko de mia apartamento loĝas bela junulo. Mi scivolas kiun



interesan vivon li havas. Mi ofte vidas lin reveni hejmen kun pluraj geamikoj.

Nia loka biblioteko organizis specialan eventon: *Konatiĝu kun viaj najbaroj*. Ĝi okazos venontan sabaton. Mi decidis iri. Eble mi povos ekscii pli pri tiu bela junulo.

Jen sabato alvenis. Mi konstatas, ke la maljunulino kaj ankaŭ la bela junulo venis al tiu evento. Trideko da personoj estas tie. Tamen ni ne rajtas elekti kun kiu babili. La nomoj de ĉiuj partoprenantoj estas skribitaj sur kartetoj, kiuj estas en ĉapelo. Jen mi aŭdas mian nomon, nun mi devas preni karteton por ekscii kun kiu mi babilos dum la venonta horo. Mi esperas, ke estos tiu bela junulo. Ho ne, mi prenis la karton kun la nomo de la maljunulino. Nu supozeble mi pasigos enuigan horon kun ŝi. Kion interesan ŝi povus rakonti kiam ŝi pasigas preskaŭ la tutan tempon sola en sia apartamento?

Jen mi rajtas pridemandi ŝin kaj do, provante ekscii pri kio ŝi interesiĝas, mi demandas kiujn televidelsendojn ŝi ŝatas spekti. Mi surpriziĝas kiam ŝi respondas, ke televidilon ŝi ne posedas. Ŝi ne havus tempon por spekti televidon. Do kion ŝi faras sola la tutan tagon?

“Mi ja posedas komputilon”, diras la maljunulino “kaj ĝi ebligas min komuniki kun multaj personoj. Kvankam mi malofte renkontas personojn, mi ĉiun tagon komunikas kun plej diversaj homoj: kuracisto el Ĉilio, japana instruisto, hungara doktorino, islanda poeto, franca kantisto, ktp. Mi ne sentas min soleca, ĉar mi ege multe komunikas kun personoj skribe.”

“Kiamaniere vi ekkonis tiujn personojn?”

“Pro la fakto, ke ni ĉiuj parolas la saman lingvon, tio estas Esperanto.”

“Ĉu vere? Mi pensis, ke neniu parolas

Esperanton.”

“Ni ne vere scias kiom da personoj scipovas paroli Esperanton, sed certe estas pli da interesaj homoj, kiuj parolas ĝin ol mi havas tempon por komuniki.”

“Kial vi decidis eklerni tiun lingvon?”

“Ĉar mi konstatis, ke lerni la anglan lingvon estas tro temporaba kaj malfacila, mi ja mem ne estas denaske angloparolanto kaj mi esperas, ke Esperanto povas faciligi internaciajn amikecojn kaj helpi homojn pli bone kompreni homojn, kiuj malsimilas al ni kaj do fariĝi multe pli toleremaj. Mi ankaŭ tre konscias pri la maljusteco en internacia komunikado, ke denaskaj angloparolantoj povas komforte uzi sian propran lingvon, kiam aliaj tion ne povas.”

Mi ne imagis, ke tiu maljunulino havas tiajn grandiozajn ideojn kiel faciligi internacian komunikadon inter diversaj personoj. Kiom interese!

“Krom Esperanto pri kio vi interesiĝas?”

“Mi interesiĝas pri lingvoj ĝenerale. Nun mi ofte pasigas almenaŭ duonhoron tage studante la ĉinan lingvon. La vortkunmetado en la ĉina fascinas min. Mi eĉ verkis libron por infanoj pri lingvoj.”

“Vi verkis libron? Nekredeble. Mi tute ne sciis, ke mi loĝas apud verkistino!”

“Mi ankaŭ ŝatas krei retejojn. Mi verkis ekzemple retejon pri infanlibroj de brita eldonejo. Tiu retejo estas bone konata de kolektantoj tra la tuta mondo.”

Mi, kiu loĝas apud ŝi, apenaŭ konas ŝin, sed personoj je la alia flanko de la mondo uzas ŝian retejon!

“Kion vi faras vespere? Ĉu televidilo ne mankas al vi vespere kiam vi komencas laciĝi kaj deziras malstreĉiĝi?”

“Mia plej ŝatata okupo vespere estas kunmeti puzlojn de proksimume



1000 pecoj. Antaŭ kelkaj monatoj mi eĉ partoprenis en puzla konkurso. Dum la konkurso mi sukcesis kunmeti puzlon de 500 pecoj en malpli ol 2 horoj.”

“Ĉu vere ekzistas konkursoj pri puzloj kaj vi partoprenis? Mi ne sciis, ke tiaj ekzistas.”

Jen unu horo ege rapide trapasis. Mi miras, ke tiu maljunulino fakte havas tre interesan, neordinaran vivon. Kiom mi eraris pri ŝi. Ŝi interesiĝas pri multo kaj eĉ havas grandiozajn ideojn por ke la tuta mondo estu unu granda familio kaj kunvivu en paco. Ŝi havas fortajn sentojn pri justeco kaj la maljusteco uzi la anglan kiel internacian lingvon. Krome mi ne vere

konsciis pri la malfacileco de la angla lingvo.

Kaj kio pri mia alia najbaro, la junulo? Nu eble li havas tute ordinaran vivon, laborante en enuiga posteno kaj poste babilante pri futbalo kun kelkaj amikoj. Nu, mi ne vere scias. Eble la biblioteko ree organizos tian eventon, sed eble la junulo surprizus min negative. Eble mi iam havos la kuraĝon rekte alparoli lin kaj provi havi veran konversacion kun li.

Mi ĝojas, ke mi havis la eblecon ekscii pli pri tiu maljunulino.

Konkludo: ne juĝu personojn laŭ aspekto. 📌





# poeziangulo

kun **KIT KELEN (MARKWELL, NSK)**

Ni enkondukas rubrikon, kiu prezentas la laboron de aŭstraliaj kaj nov-zelandaj poetoj kaj antaŭsignas dulingvan antologion, nuntempe en preparo. Unue prezentante la poemon, *Falsa promeso sur petaloj* de Magdalena Ball.



Magdalena Ball (en la foto) estas Administra Redaktoro de *The Compulsive Reader*. Ŝiaj verkoj estis vaste publikigitaj en literaturaj ĵurnaloj kaj antologioj, kaj ŝi estas la verkinto de kelkaj romanoj kaj

poeziolibroj, la plej lastatempa el kiuj, *The Density of Compact Bone*, estis publikigita en 2021 fare de Ginninderra Press. Eksciu pli pri Magdalena ĉe [magdalenaball.com](http://magdalenaball.com).

### Falsa promeso sur petaloj

Vespero verŝiĝas  
surprizante ĉiujn.

Ĉiam estas la maniero  
peze kaj malseke, grundo fluanta

kiel ĉio, kion vi iam bezonis  
sed tro multe samtempe

la kukurbetoj nomiĝas Reĝo Midas  
velkantaj en sia propra likva oro

terpomoj koruptitaj, iliaj rompitaĵoj korpo  
purpuraj gemoj, sangantaj en la teron.

Kukumoj tro frue falas de la rebo  
nutrantaj nur fungon en rozkolora griza  
nebuleto.

Mi ankaŭ ensangas, mia korpo en stato  
de ŝanĝo, ellasita de diluvo

Mi ĉiam estas pluvo, falsa promeso,  
petala moleco, kaskadanta malsupren  
malsupren

en radikojn dissolviĝantajn.

### False promise on petals

Evening pours in  
taking everyone by surprise.

It's always the way  
heavy and wet, dirt flowing  
like everything you ever needed  
but too much all at once

the zucchinis are King Midas  
withering in their own liquid gold  
potatoes corrupted, their broken bodies  
purple gemstones, bleeding into the earth

Cucumbers fall too early off the vine  
nourishing only fungus in pinky grey  
mist.

I am also bleeding in, my body in a state  
of change, loosened by deluge

I have always been rain, a false promise  
petal softness, cascading down  
down

into roots dissolving. 



# KONTRIBUU al ESPERANTO

sub la suda kruco

La limdato por la  
venonta numero estas la  
la de aŭgusto. Sendu  
artikolojn, rakontojn,  
enigmojn, receptojn,  
fotojn ktp al  
esk@esperanto.org.au -  
ni bezonas vin!



## Agnoskoj pri fotoj

**Kovrilo** David Ryan

**4** Jonathan Cooper

**5** Augustus Marshall, per Universitato Princeton (donaco de Laurence Hutton)

**6** *Helen Keller kaj Anne Sullivan* 1893 (kolorigite). Foto: CM Bell, per Library of Congress, Usono

**6** *Helen Keller sidante kaj legante brajlan libron, Westport, CT, 1960.* Fotisto nekonata, per American Foundation for the Blind

**7** Arwin Neil Baichoo, per Unsplash

**8** Jaunathan Gagnon, per Unsplash

**10** Nekonata, per Nicole Else

**11** Nicole Else

**13** Neon Joi, per Unsplash

**19, 20** Vidoj de Franca Polenezio. Fotoj: David Ryan

**21** Bobelarto

**23** Hans-Peter Gauster, per Unsplash

**24** Morgan Bell

**25** Victoria Kurtovich, per Unsplash

**28** Madelene Carney. Foto: Petro Johns

# Australian Esperanto Association

GPO Box 2122  
Melbourne VIC 3001  
Australia

esperanto.org.au  
info@esperanto.org.au  
0403 358 941

Sandor Horvath | **President**  
Jonathan Cooper | **Vice-President**  
Heather Heldzingen | **Treasurer**  
Joanne Johns | **Secretary**

## **Committee Members:**

Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**  
Chris Krageloh | **Vice-President**  
David Ryan | **Secretary/Treasurer**  
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

## **Committee Members:**

Erin McGifford, Josuo Moss, Stephen Epstein

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

# New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140  
Symonds Street  
Auckland 1035  
New Zealand

www.esperanto.org.nz  
esperantonewzealand@  
gmail.com  
0800 350 781

# What is this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

## What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

## Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

